

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Google Translate Plena Ilustrita Vortaro

PLENUMITA 13/07/2017 Tricenttrideka eldono (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



Redaktoro Roger Springer

Provlegita de Vera Payne

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj



Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Ekstudis pli ol **935,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo

per la angla lingvo. (Ekde la 28a de Majo 2015) <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

<http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine>



La gramatikaj (lingvaj) kategorioj. B.



En la antaŭa klarigo ni konstatis, ke ĉiu vorto apartenas al certa vortkategorio, kaj ke plej multaj el la vortoj havas finaĵon por montri tian kategorion. La vortoj kombiniĝas en certaj manieroj por ke ni en nia menso povu rekrei plenan bildon. Ni do uzas la vortojn, la lingvon, por pluraj celoj: Unue por reprezenti tion kion ni perceptas, kaj due por registri la perceptojn en nia menso kaj tiel poste memori ilin, kaj trie por publikigi al aliaj per vortoj tion kion kreis nia menso pri la afero aŭ simple tion kion nia menso perceptis. Krome la celo estas agi por ke iu faru ion, do reagu al bildo de perceptitaĵoj.

La perceptoj kutime konsistas ne en unu malgranda parto de la mondo ĉirkaŭ ni, kaj en ni, sed ili formas kombinaĵojn de aferoj. Ĉar por pluvivi ni devas utile agi en la mondo, ni kutimas percepti la mondon kiel farantan agon kontraŭ kiu ni devas reagi. Ankaŭ tiuj niaj reagoj kutime konsistas el kombinaĵoj de aferoj. En tiuj kombinaĵoj la diversaj aferoj havas diversajn funkciojn, kune formantajn unu bildon. Nia menso organizas la bilderojn en certaj maniero kaj ordo, per vortoj reprezentantaj la diversajn partojn de la bildo. La kategoria speco de vorto ofte decidas pri ĝia funkcio en la bildo kaj en la lingvo. Ni do venontfoje rigardos tiujn kategoriojn kaj iliajn funkciojn en la bildo.

(daŭrigota)

Marcel Leereveld.

“Malgrava historieto pri mia vivo” (Bob Felby)

Nun AE kopias la tutan libreton iom post iom ĝis la fino.

Bona rakonto kaj bona Esperanto



Ĉapitro 1 Mia infanaĝo (13a parto)

Ni estis hejme. En la nokto la angloj atakis de la aero, kaj la teruraj alarmiloj sonis. Mia paĉjo deprenis min el la lito, kaj metis min sur la plej sekuran lokon en la domo, nome la plankon. Sed neniu bombo falis sur nian domon. Iom pli poste li reenmetis min en la lito, kaj mi daŭrigis la dormadon.

En la mateno ni aŭdis, ke sabotistoj sabotis radiofabrikon en Valby.

Mi ne povis iri lernejen, ĉar estis truo en mia ventro. Truo granda kiel 20-cenda monero. Ĉiutage mi sidis sur la biciklo de mia paĉjo, kiu veturigis min al la kuracisto 20 minutojn for. Tiu purigis la vundon per benzino, kaj vere, kelkajn semajnojn poste, la vundo estis for.

Sed ni havis malfacilaĵojn survoje hejmen de la kuracisto. Ĉiutage mia paĉjo biciklis kun mi, kaj ĉiutage iu frenezulo, gardostaranto antaŭ la pordo de F.L. Schmidt, pli poste konata kiel “Valby Maskinfabrik”, granda metalfabrika en Valby, haltigis nin, kaj ordonis, ke mi devas piediri hejmen, ĉar mi estas tro granda por sidi sur la biciklo de mia patro. Tiu ulo, populare nomita de la popolo, “ĉevalido”, deĵoris por la okupantoj, do ne estis surprize, ke li agis tiel, kiel li agis. Li sendube suferis pro komplekso de malplivaloro. Ni lernis piediri preter lian pordon, kaj iom poste daŭrigi la bicikladon!

Tiam mi rekomencis piedpilkludadon. Oni starigis min en la golujon, venis la pilko, ĝi fortege frapis mian ventron, mi sentis kvazaŭ la sango kuras malsupren laŭ miaj kruroj, kaj mi iris hejmen. La vundo ne remalfermiĝis, sed post tiam mi ne plu piedpilkludas. Tamen mi atletikis, precipe naĝado tre plaĉis al mi. Tio estas bona, ĉu ne, ĉar ĝis nun mi ne dronis!

Finfine mortis Gråper, kaj ni akiris alian, ĉi tiun fojon katidinon. Ni nomis ŝin “Dorte” por ke ŝi ne fariĝu “borte”. “Borte” signifas “for” en la dana. Iun tagon Dorte estis for, kaj mia frato Børge kaj mi serĉis en ĉiuj centoj da ĝardenoj, sed neniu Dorte troviĝis tie. Fine ni vidis ŝin. Ŝi sidis malantaŭ fenestro kaj rigardis nin. Ni kuris hejmen kaj rakontis al mia patro, kie Dorte estas. Mia patro tuj venis kun ni, vidis sian katon malantaŭ la fenestro, prenis ŝtonon kaj rompis la fenestron, kaj prenis Dorte. Grandega ĝojo kiam ŝi ree estis en sia hejmo.

Tiam revenis la katŝtelinto biciklante preter nian domon el sia laboro. Mia patro haltigis lin, kaj demandis lin, kie li ŝtelis la biciklon. Li respondis, ke li ne ŝtelis ĝin, sed ke li aĉetis ĝin. “Kial vi ne aĉetis katon, anstataŭ ŝteli ĝin?” demandis mia patro. “Mi ne havas katon” li respondis. “Ne plu” diris mia patro, ĉar mi rompis vian fenestron kaj reprenis la katon. La ŝtelinto ne plu parolis, kaj ĝis hodiaŭ li ne diris eĉ unu vorton al ni!

Daŭrigota

Bob Felby



Ĉu vi subskribis la peticion?

Se vi ne jam faris, klaku kaj subskribu la verdan supran lokon.

Esperanto bezonas milionojn da nomoj. Kion faras la milionoj da Esperantistoj? Subtenu nin! Ĝis hodiaŭ nur 400 subskribis tiun peticion. (Por Esperanto, tiu peticio povus esti gravega,)

Roger Springer



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian Sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

La 15an de Julio estos la tria Sabato. Venu. Lernantoj, vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.



Mi ĉeestas tiun bonan Esperanto-klubon kaj raportas al AE pri la klubo. **Roger Springer**

PRI MIA ĜARDENO KAJ PRI VIA OBSTINO.

Ĝardeno

A. La pluvakvo de la domo de mia najbaro kaj de mia domo fluas en akvolilian (= kun nimfeoj) lageton kaj post tio al alia najbaro. Ĝi fluas ankaŭ trans sub larĝega kverko pli ol centjara. Somere mia lageto ofte malplenas. La akvo de la kuirejo rekte fluas al tiu kverko kaj post tio al la ĝardeno de tria najbaro. La kvara kaj la kvina kaj la sesa najbaroj ricevas nenian fluaĵon el mia domo. La ekskremento el miaj tri necesejoj eniras en fekaĵbasenon centjaran malantaŭ la domo, kaj bakteriumite eliras kiel plantnutranta akvo subtere en la ĝardenon. La ĉirkaŭantaj domoj pli novaj estas ligitaj al registara kloaksistemo. Mia brika domo konstruatis, sur rokoj sur la grundo, en la jaro 1904 kaj post kelkaj jaroj uzatis ankaŭ kiel la unua registara lernejo elementa en la tiam farmista distrikto. En tiu tempo ĝi uzatis ankaŭ kiel la kunvenejo de la loka Esperanto-grupo (*Belgrave South/Lockwood*), kies prezidanto estis la en la lernejo/domo loĝanta sola instruistino por la ses klasoj. La domo estis, kaj plu estas ĉar ĝi estas nemovebla, 40 km. for de la centro de Melburno.

Obstino

B. Vi (preskaŭ ĉiuj) malpravas. Ĉu la plejmulto ĉiam pravas? Ĉu Galilejo malpravis ĉar ĉiuj malkredis lin? Mi montros ke vi (preskaŭ ĉiuj) malpravas, sed eĉ tiam vi daŭrigos diri ke malpravas mi, ĉar la samon daŭrigis diri la amasoj pri Galilejo, dum longa tempo. Vi do ne estas pli bonaj ol tiuj kiuj kredis ke la tero estas plata, vi, kiuj ne uzas ĉefliteron por la tagoj kaj la monatoj. Kial vi ne same diras ke la klimatsanĝo ne kaŭzatas de la homoj? Pluraj el vi ne pensas ke vi pravas sed malŝatas novaĵojn kiuj montras ke vi iam malpravas. Se vi ne uzas ĉefliterojn vi traktas tagojn kaj monatojn kiel komunajn vortojn. Vi rajtas fari tion, sed nur se vi obeas la regulojn por la komunaj vortoj, kion vi ne faras. Jen ili estas: Enirante butikon vi diras, ke vi volas aĉeti "biciklo"n. T.e. "iun ajn" kaj ankoraŭ ne difinitan. Kiam vi kaj la vendisto scias, kiun difinitan biciklon vi volas aĉeti, vi demandas: Kiom kostas "la" biciklo? Vi ne demandas "Kiom kostas biciklo?", ĉar tio signifas iun ajn biciklon. Vi diras "Ĉu mi povos pagi (kaj ricevi la biciklon) post tri tagoj?", (nun estas Vendredo). La vendisto respondas: Jes, vi povos pagi "la lundon". Se li dirus "Vi povos pagi "lundon"", tio signifus "iun ajn lundon". Nu, vi diros al mi, ke "la lundon" sonas strange en via etna lingvo kaj ke tial vi ne uzus tion en Esperanto. Do vi agas kiel la kredantoj en ebenan planedon aŭ en nehuman klimatsanĝon. Se vi ne estas tiaj kredantoj, vi traktas Esperanton kiel nevaloran ĉar vi ne bezonas obei ĝiajn regulojn dum vi obeas la logikon de la klimatsanĝo. Kaj krome via tialo ke la etnaj lingvoj ne diras "la lundo"



hazarde malfortas, ĉar ekzistas almenaŭ unu etna lingvo, kiu logikas kaj faras same kiel oni devas fari en Esperanto, nome la germana *'ich bezahle am (= "je la") Montag'* (ĉiuj substantivoj senescepte portas la ĉefliteron, kvankam estas movado kiu deziras ŝanĝi tion, kiel oni jam faris en Danujo.). Do ĉu la germana lingvo estas pli inteligenta ol (preskaŭ ĉiuj) vi kiuj diras "Mi venos lundon" (= mi venos iun ajn lundon) anstataŭ "la lundon"? Kompreneble se oni traktas la nomojn de tagoj kaj de monatoj kiel personajn (proprajn) nomojn kaj tial uzas ĉefliteron, oni ne povas uzi "la", ĉar oni ne diras "Mi vizitos la Petron hodiaŭ vespere", do "Mi venos Lundon"

Ĝardeno

C. Dum pluraj fremdaj plantoj en Melburno reagis al la temperaturo kaj tial komencas flori nun, kontraŭkutime, la aŭstraliaj plantoj ŝajnas reagi pli al la alteco de la sunpozicio, kaj tial daŭrigas siajn kutimajn flortempojn. Unu tia estas speco de akacio, kiun mi plantis en mia vojflankejo kaj kiu post unu semajno estos "maro" da belega flavo. Aliaj specoj de akacioj havas aliajn flortempojn, kaj same ne reagis al la temperaturoj.

Aglutina sistemo

Ĉ. Kiel ludon aŭ serioze vi povas eksperimenti en Esperanto (kaj en etnaj lingvoj), sed vi tiam devas scii aŭ eltrovi la ĝustan signifon de la vorto. Oni povas fari novan vorton oficialan nur kunmetante jam oficialajn radikojn, laŭ la aglutina sistemo, aŭ per alikategoriigado, t.e. doni al radiko unu el la finaĵoj -o, -i, -a, aŭ -e malsaman al la kategorio de la radiko. Ekzemple el la verba radiko "kur-" oni povas krei adjektivan "kura" aŭ el la prepozicia radiko "sen" oni povas krei la verbon "seni". Grava kondiĉo estas, ke la nova vorto havu bezonatan signifon, do ke ĝi ekzistas ankaŭ en etnaj lingvoj. Do "kura" akcepteblas en "ŝia kura rapideco", dum por "seni" ne ekzistas nocio en la etnaj lingvoj aŭ oni jam havas korespondan esprimon, kiel "Li estis sen ĉapelo" por la ebla sed ne uzinda "Li senis ĉapelon". Do necesas ekcerti ĉu la nova vorto estas bezonata aŭ havas nocion. Por alia ekzemplo ni provu alikategoriigi kelkajn tabelvortojn (korelativojn). Unue "la tielo" estas la respondo (= "t") al la demando "kiel", en kiu maniero", do al la kielo (= demando) pri iu ago (angle: *the answer to the "how" is the "so", the manner*, la tielo). Ĉar Esperanto kaj la angla jam havas specialan vorton por tiu "tielo", nome la maniero, ni ne bezonas tiun vorton "tielo". Same ni ne bezonas la vorton "tiomo", kvanto, nek "tiamo", tempo, momento, nek "tiero" por la loko, nek por la aliaj, escepte de unu, "la tialo", angle *the reason, the "why"*, aŭ pli bone *the "therefore"*, por kiu Zamenhof ne kreis specialan vorton. Tiu vorto, "la tialo", ĉar sen alternativo, estas bezonata por traduki la anglan *"the reason, the therefore"*. Do "tialo" estas vorto tre bezonata en Esperanto kaj ankoraŭ malofte uzata. Pro nekompreneblo oni anstataŭe uzas "la kialo", kiu malĝustas ĉar ĝi signifas la demandon, ne la "tial", la respondon. Do, ree, vi faras eraron se vi sekvas la ne sufiĉe kleran plejmulton (ne kulpigu Zamenhof, kiu tiutempe eŭropajn stultaĵojn uzi devis). Do se mi demandas "Kial li ne venis?" mia demando estas la kialo (pri lia neveno), kaj via respondo, via "tial", via "Li maltrafis la aŭtobuson", estas la tialo, angle *the reason*. Bonŝance Esperanto povas esti logika kaj perfekta. Notu ke kielo kaj kielio kaj kiam kaj kialo preskaŭ neniam uzeblas, ĉar oni simple uzas la esprimon "la demando pri (io)".



Marcel Leereveld.





Charles Stevenson prelegas

El Adelajdo

informis Katja Steele



La kluban kunvenon de Merkredo, la 5-a de Julio, partoprenis dek homoj. Charles Stevenson prelegis pri la pionira tempo de la aŭstralia Esperanto-historio kaj elstarigis tri eksterlandajn vizitantojn. Inter aliaj ni eksciis, kiel tiuj tri opiniis pri la siatempaj aŭstralianoj kaj poste ĉiu ĉeestanto donis sian juĝon pri la trajtoj de averaĝa aŭstraliano de la nuna tempo.

Semajna raporto de Melburno



DIMANĈA KUNVENO

Dimanĉon la 9a de Julio ses homoj kunvenis ĉe ACMI Cafe & Bar. La nova loko estas tre agrabla kaj ni babilis pri multaj aferoj.

LUNDA KUNVENO

Lundon la 10a de Julio ses homoj kunvenis ĉe Ross House. Ni babilis, kaj tradukis iom pli da *Mil kaj unu noktoj*.

VENONTAJ KUNVENOJ

Dimanĉon 16a de Julio je 15:00

[Dimanĉa kunveno](#), ĉe nova loko: ACMI Cafe & Bar, Federation Square

Lundon 17a de Julio je 18:30

[Lunda](#) kunveno, ĉe Ross House, 247 Flinders Lane

Sabaton 29a de Julio je 19:00

[Ludvespero](#) ĉe Alchemists Refuge, 328 Little Lonsdale Street

NUNAJ SEKVANTOJ (Aiklaku la nomon por iĝi plua!)

[Meetup](#) – 856

[Instagram](#) – 77

[Facebook](#) – 295

[Telegram](#) – 20

[Twitter](#) – 267

Joanne Johns



Skribu pri via klubo